

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aidonoj: „Internacia Komerco“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 161
14. 10. 1923

Redakcio:

Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfonto
Horrem bei Köln, Germanlando.

Tarifen

vidu sur speciale folio, kiu estas aldon-
ata al ĉiu specimena kaj unua numero
de nova abono.


Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

La XVI-a laŭ decido de la C. K. en Wien. (Paĝo 2!)

La lago Baikal.

„La sankta maro“ nomas la siberianoj tiun interesegan reĝon de la siberiaj lagoj. Ĝi egalas laŭ grandeco adriatikan maron (30 000 kvadrataj kilometroj) kaj havas longecon de 600 km kaj larĝecon de 50 ĝis 90. En suda parto ĝia profundeco atingas 1600 metrojn. Somere ĝia helverda akvo estas en tia grado travidebla, ke fundon oni povas vidi en profundeco de 10 ĝis 12 metroj, kaj mallaŭte la lago plaŭdas ĉe bordo de kruĉaj, arbarkovrita, altaj montoj. Printempe kaj aŭtune subitaj uraganoj transformigas Bajkalon en nemezur-eblan kaldronon da gigantaj bolantaj ondoj, kapablaj sur bordon eljeti ŝtonojn de grandeco de homa kapo. Pro tio la ĉirkaŭloĝantaj indiĝenoj kaj ankaŭ rusaj kamparanoj timas Bajkalon kiel iun pereigan, minacantan potencon. Plej minacajn rokojn la fantazio de Tungusoj kaj Burjatoj loĝigis per malbonaj, terurigaj diaĵoj, al kiuj ili alportas favorigajn oferdonaĵojn.

La malvarmega akvo de bajkala lago nur je fino de somero iom varmiĝas; ĉar ĝi dum sufokigaj siberiaj somermonatoj rimarkeble freŝiĝas la aeron de ĉirkaŭaĵo, la lago estas la plej ŝtata celo de ekskursantoj el proksima urbo Irkutsk. Sed kompense vintre la maltrankvila, ondanta Bajkal longe vaporfumiĝas, ne glaciĝas kaj pelas sur sia dorso pecojn da glacio, el kiuj ĉe bordo ĝi amasigas netraireblajn montojn — kaj tiam akvo de Bajkalo iom varmiĝas ĉirkaŭan malvarman aeron. Nur en decembro la tuta lago definitive estas katenigata per glacio de duonmetra dikeco. Je forta malvarmo, tuta foresto



Transbajkala fervojo.

de vento kaj neĝo — ĉefaj ecoj de vintra klimato en Bajkalregiono — la lago prezentas senfinan, glatan glacian surfacon, sur kiu sin respeguligas pintoj de ĉebordaj montoj kaj super kiu etendas sin purblua, sennuba ĉielo. La faŭkantaj fendoj, kiuj dum komenco de vintro tiom terurigas veturantojn sur Bajkalo, definitive fermiĝas.


Plej kaprica la lago estas printempe: foje ĝi trankvile dormas sub sia glaciana kovrilo ĝis fino de majo, foje jam en mezo de aprilo ĝi subite disbatas ĝin je mil pecoj.

Sen nombraj riveroj kaj riveretoj nutras la gigantan lagon; ĉefa inter ili, Selenga, alfluas el Mongolio tra montaro Hamar-Daban. Ne malpli interesa, ol la lago mem, estas ĝia elflusa riverego


Angara: la rapidfluan, mirinde travideblan, verdetan torenton ĉe decembroj siberiaj frostoj ne povas glaciĝi. Nur je novjaro vico da 40 ĝis 45-gradaj frostoj superruzas la malkvietulon: glacio formiĝas sur fundo de rivero, grandaj pecoj leviĝas kun enŝlositaj ŝtonoj al supraĵo, baras fluan inter la multinombraj insuloj kaj tiamaniere iom post iom haltigas riveron. Sed jam post tri monatoj ĝi disrompas siajn ĉenojn kaj kun neretenebla rapideco glacion forportas kaj eljetas sur bordon. Tie ankorau longe ĝi degelas, kiam ĉirkaŭe jam ĉio verdiĝis.

Al finkonstruo de transsiberia fervojo la Bajkalo obstine kontraŭstaris. Por preterveturi ĝin, oni laŭ suda roka bordo (300 km) devis konstrui 40 tunelojn, multajn viaduktojn, galeriojn kaj pontojn. Dume du grandaj vaporŝipoj kunigis la orientan kaj okcidentan parton de la siberia linio. Ili estis menditaj en Anglujo kaj parte transportitaj tra norda glacia maro — Jenisej — Angara kaj kostis 6 1/2 milionojn da rubloj. „Bajkal“, la pli granda, posedis 15 kaldronojn kaj povis 30 fervojajn vagonojn transveturigi. Malgraŭ sia forteco ĝi povis nek disrompi la vintran bajkalan glacian nek vojaĝi dum teruraj aŭtunaj ventegoj. Dum artileria batalo inter ĉeĥoj kaj bolŝevikoj someron 1918 la trajekto „Bajkal“ forbruliĝis.

Ĝis malfermo de ĉirkaŭbajkala fervojo oni vintre sur glacian metis relvojn kaj per ĉevaloj veturigis ŝarĝitajn vagonojn. Dum rusa-japana milito oni provis anstataŭi ĉevalojn per lokomotivo. Sed tian perfortigon la bajkalia diaĵoj ne permesis — la lokomotivo estis tuj engluita de la profunda lago. H. Frank, Kazan'.



Lago Baikal.



Glacio sur Bajkalo.

Malsato en Rusujo.

(Rerigardo 1921—1923.)

La kaŭzoj de malsato, kiu trafis plej fruktodonan parton de Rusujo, estas trovitaj jam en la granda milito de 1914, kiu tiom ŝanceligis la vilaĝan mastrumadon de Rusujo, sen tio jam malfortan. Fabrikoj, absorbitaj de laboroj por militbezonoj, fabrikis nur 4% de necesa agrikultura ilaro. La ilaro eluziĝis, ĉevaloj kaj brutaro senindulge estis rekvizitaj por militaj celoj. La mondilito tiamaniere forprenis de vilaĝa mastrumado ĉiujn laborfortojn. Poste sekvis interna milito kaj blokado. Rikolta defico de 1920 konsumis mizeran provizojn de antaŭaj jaroj, kaj jam en januaro de 1921 manko de nutraĵoj fariĝis sentebla. Kaj someron 1921 sekveco trafis la tutan Sudan-Orienton kaj grandan

parton de Oriento de Eŭropa Rusujo, sekveco, kiu por ĉi tiu regiono estas perioda fenomeno, ripetiĝanta kun severa laŭleĝeco kaj de tempo al tempo katastrofe frapanta la mastrumadon de tiu regiono. Tiel de 1891 ĝis 1911 estis tri senrikoltaj, 13 rikoltdificitaj kaj nur 5 rikoltrikaĵaj jaroj.

El 155 milionoj da loĝantoj de Sovet-rusujo malsatis en februaro 1922 en 16 apudvolgaj gubernioj 13 772 613 homoj, i. e. 10% de la tuta loĝantaro. Al listo de malsatantaj gubernioj poste ankorau aliĝis Krimeo, Ekaterinoslava gubernio, partoj de Odesa kaj de Dongubernio. En nur 16 apudvolgaj gubernioj estis en januaro 1922 — 5 698 000 malsatantaj infanoj. Pri detaloj de tiu terura mizero ne estas necese raporti. La tuta mondo aŭdis pri ili (komp. ankaŭ „Revuo“ n-o 8, VI, 1923 de ET: Unu paĝeton el la jaro 1921).

Jam la 17. de februaro 1921 estas kreita per aparta dekreto de Centra Plenuma Komitato la Komisiono de Helpe al Malsatantoj, kiu energie komencis organizi helpagadon. La 10. de julio estas disvastiĝinta en ĉiuj landoj la alvoko de Maksim Gorkij. En julio ankaŭ komencis intertraktado kun Amerika Administracio de Helpe (ARC. American Relief Commission) kun kiu 20. VIII. en Riga estas fiksita kontrakto. Soveta registaro liberigis la malsatantajn guberniojn de naturprodukta imposto, liveris semon por antaŭvintra semado, alskribis al ĉiu nemalsatanta gubernio unu malsatanton, por kiu la sata regule devis zorgi laŭ siaj fortoj. Ĝis majo 1922 la registaro elspezis por aŭtuna kaj printempa semo, por terpomoj, por publika nutrado, por evakuado de 710 000 malsatantoj en pli feliĉajn regionojn, kaj por aliaj helpagoj pli ol 170 milionojn da

oraj rubloj. Helpon al malsatantoj celis ankaŭ la rekvizo de preĝejoj riĉaĵoj per la registaro. Je konto de tiuj riĉaĵoj la Centra Plenuma Komitato tuj eldonis 1 000 000 orajn rublojn. Por tiu mono en eksterlando estas aĉetitaj 5 000 tunoj da greno (800 000 or. rub.); 100 000 estas transdonitaj al Krimeo kaj 100 000 al Stavropola gubernio. Krom tio tre multe helpis la loĝantaro en ne malsatantaj regionoj de la respubliko: ĉie oni kolektis; laboristoj, oficistoj kaj soldatoj oferis parton de salajro; multaj entreprenoj malfermis azilojn por infanoj evakuitaj el malsatantaj gubernioj; por kolekti monon estas aranĝitaj loterioj, bazaroj, koncertoj kaj ĉiuspecaj spektakloj.

La 30. julio 1921 Komintern direktis alvokon al tutmonda laboristaro. Kiel respondo la 12. aŭgusto estas organizita Internacia Komitato de Laborista Helpe al Malsatantoj de Soveta Rusujo.

La Deksesa laŭ decido de la C. K. en Wien.

Laŭ la traktado en la kongreso de Helsinki pri la nova organo de nia movado nun la Centra Komitato (C. K.) decidis pri la okazigo de la universalaj kongresoj. Ĝi sekve de tio ekzamenas la dezirojn de la Esperantistaro kaj la ĝeneralajn cirkonstancojn.

Kiel estas konate, en Nürnberg invitis la bulgarijn kaj la aŭstrijajn samideanojn. Voĉdono en la kongreso konstatis malgrandan plimulton da voĉoj favore al Sofia laŭ invito de la bulgara samideano. Ni ankaŭ kun plezuro povis sciigi en numero 159 de nia gazeto, ke la bulgara registaro favore akceptis la proponon de niaj samideanoj.

Car en Nürnberg jam aŭdiĝis duboj pri la laŭleĝeco de la voĉdono pro neĉeesto de belgaj kaj francaj samideanoj, la C. K. interrilatis kun tiuj samideanoj. Ili voĉdonis favore al Wien. Sekve de tio la voĉoj por Wien superas tiujn por Sofia. Konsiderante tiun ĉi faktan kaj kelkajn aliajn punktojn tre gravajn, la bulgarijn samideanojn provizore rezignis. La C. K. nun decidis la okazigon de la Deksesa en Wien dum somero 1924.

Sendube multaj samideanoj estus volonte veturintaj al Sofia por ĝui la vidindaĵojn de

Diversaj laboristaj organizaĵoj, profesiaj unuigoj, kooperativoj, socialistaj kaj komunistaj partioj en Ameriko, Anglujo, Francujo, Germanujo, Belgujo, Ĉeĥoslovakio, Italujo, Svedujo, Danujo, Svisujo, Bulgarujo ktp. plej energie helpis batali kontraŭ la terura malfeliĉo. Ekzemple de 1. I. ĝis 1. IV. 1922 la Internacia Laborista Helpe sendis al la malsatantaj regionoj 322 vagonojn kun manĝaĵoj, vestaĵoj kaj medikamentoj.

Inter eksterlanda helpe estas plej gravaj la helpa misio de Fritjof Nansen kaj de Amerika Helpa Administracio (ARC). Je 1. julio 1923 ARC likvidis sian dujaran helpagadon. Rezentita en Rusujo per 500 amerikanoj, ĝi pri-laboris 32 guberniojn, importis nutraĵojn, tolaĵojn, vestaĵojn, ŝuojn, kuracilojn kaj aliajn helpilojn en valoro de 275958500 rubloj kaj nutris per fielnomata aldona porcio (pano, kakao, kaĉo):

XII. 1921	1029376	VII. 1922	10387688
II. 1922	1562200	XII. 1922	982920
IV. 1922	5712038	IV. 1923	2269052
VI. 1922	8876139		

homojn.

Fako de Ara=Asocio de Junuloj nutris per tagmanĝo 10000 studentojn. Multon helpis ankaŭ filantropaj organizaĵoj, Ruĝa Kruco, Kvakeroj, Menonioj ktp. ktp.

La plej terura malsato nun pasis, dank' al la ĉiufanka helpe kaj dank' al la bona rikolto en aŭtuno 1922. Ankaŭ ĉi tiu jaron oni kolektos sufiĉe bonan rikolton. Sed restis la sekvoj de malsato: multaj vilaĝaj mastroj estis sen semo, sen bruto (precipe sen laborbruto) kaj sen laboriloj, disvenditaj en la periodo de akuta malsatado por kelkaj funtoj da pano. Mankas rimedoj, sukcese batali kontraŭ akridoj, kiuj pro tio ĉi tiu jaron, grandamase allugantaj el Persujo, laŭ Volga norden penetris ĝis Perm kaj multe malutilis. Nezorgataj estas infanoj, perdintaj siajn gepatrojn. Oni ne povas sufiĉe subteni la forkurintojn de la malsato ĉe ilia reevakado kaj instalado en hejma vilaĝo. Estas multaj invalidoj de la malsato, postulantaj asekuron. La loĝantaro en la malsatintaj regionoj tre inklinas al diversaj malsanoj; estas vilaĝoj, en kiuj nuntempe 100% de la loĝantaro malsanas je malario. Kaj kuraciloj forestas. Forigi tiun vicon da malsatosekvoj postulos ankoraŭ insistan laboron dum multaj jaroj.

Por kontentigi ĉiujn suprecitajn bezonojn la Tutrusa Centra Ekzekutiva Komitato organizis la 15. oktobro 1922 Centran Komisionon por likvido de la malsatosekvoj. La nonprovizo disponata de tiu ĉi komisiono estas multe pli malgranda ol tion postulas la grandiozezo de la taskoj, kiuj staras antaŭ ĝi. Pro tio Soveta registaro denove sin turnis al eksterlando kun peto, helpi al la suferintoj de la malsato en Rusujo. Kelkaj helporganizaĵoj jam renovigis sian laboron en Rusujo.

Laŭ div. fontoj H. Frank, Kazani.

Vi parolas pri miloj da Esperantistoj
Pruve, ke estas almenaŭ
dek mil

UEA bezonas dek mil membrojn.

Aligu!

Delegitoj en preskau ĉiuj urboj. Ĉiu Esperantisto devas esti membro.

Centra Oficejo de Universala Esperanto Asocio,
12, Bd. du Théâtre, Genève.

balkan-vojaĝo. La favoremo de la bulgara registaro kaj la fervorego de niaj bulgaraj samideanoj sendube estus certigintaj plenan sukceson de kongreso en Sofia. Ĝi estus ankaŭ povinta trege influj la movadon sur la balkano. Restas nun al ni la espero, ke tiuj klopodoj ankoraŭ valorigos poste.

Nia movado en Aŭstrio pli kaj pli fortiĝas. Niaj aŭstrijaj samideanoj kaj precipe tiuj de Wien povas garantiĝi bonan sukceson de l'Deksesa. Ilian organizan talenton ni povos konstati en la venonta jaro kaj ni ne dubas, ke ili nenion flanken-lasos por kontentigi ĉiujn pretendojn. Ilia laboro kaj praktika laboro estas konataj. Nia Deksesa do povos fariĝi vera kongreso de laboro konforme al la postuloj de nia ĉiam pli kaj pli progresanta movado. Speciale menciuj la allogaĵojn de Wien kiel metropolo kaj urbo de l'plej varia distrebla saĝnas ne necese. Oni venu kaj vidu.

Ni do deziru bonŝancon al la laboroj de niaj aŭstrijaj samideanoj kaj prepari nin por multnombrega kongreso en la ĉefurbo de la germanaŭstria respubliko.

Ĝis revido en Wien!

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas scigojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribite, sed ne inter administraci kaj privataj scigoj) pri ĉiu novaĵo de la Esp. movado. Kondicioj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

Landoj.

Ameriko.

Kubo.

Kelkaj informoj de Kubo konstatis gravan revigliĝon de la Esperanto-movado sur tiu ĉi insulo.

Eŭropo.

Belgujo.

Malines. La grupo malfermis novan kurson por infanoj la 17. oktobro kaj duan por plenkreskuloj la 20-an de l' pasinta monato.

Danujo.

Holboek. La estraro de „Vespera Lernejo de la Laboristoj“ enkondukis Esperanton kiel nedevigan fakon en la lernejon. Kurson gvidas s-o H. Hansen, del. UEA.

Germanujo.

Köln. La 7. 10. okazis ĉi tie ierkunveno de Rejnlanda Vesifalia Esp. Ligo (Revelo). Rezentintaj estis nur 7 grupoj (el 24), pro la trafikaj malfacilaĵoj en Rejnlando-Vesifalio. Oni pripensis diversajn punktojn, i. a. la situacion de Revelo, koizon, instruadon, lernolibrojn, gazeton, foiron, poŝton ktp. Kiel prezidan lokon por la venonta ligojaro oni reelektris Köln. Monlektoro por la Germana Esp. Instituto rezuligis duonan miliardon da gmk. Post la kunveno parto de la partoprenintoj vizitis la ampleksan foiron teron kaj rigardis la grandiozajn modernajn halojn.

Litovio.

Kauņas. Post la Nürnbergega kongreso komencis nova infano propagando. En pluraj gazetoj aperis grandaj artikoloj. La gazeto „Lietuva“ enhavis detalan artikolon de s-o A. Klimas pri liaj vojaĝ-imprezoj.

Panevėžys. Tie oni fondis Esperanto-grupon kun 34 membroj. Nova kurso kun 19 personoj estas malfermita. Krome troviĝas en tiu ĉi urbo aparta grupo de glerantoj ĉe la Litova registara gimnazio.

Rumanujo.

Odorhei (Székelyudvarhely, Transilvanio). S-o Julio Szabo, del de UEA, malfermis kurson.

Targu-Mures (Marosvásarhely, Transilvanio). F-ino Terezo Barabas, senlaca pionirino de nia movado, malfermis du novajn kursojn.

En la sama urbo s-ano Deziderio Törvissy gvidas kurson publikan en la hejmo de meli-lernantoj. Sighetel-Marmaritei (Marmarosziget.) Oni fondis Esperanto-Studentikolegion kun 80 membroj. Prezidanto estas s-o Edmundo Székely. Kursoj daŭras, biblioteko estas fondita.

Bucuresti. La Esperantistaro de la rumana ĉefurbo aranĝis bonuskesajn ekskursojn al Bufeja kaj Sinaia. Grupo „Bukuresta Esperantista Junularo“ estas fondita laŭ iniciato de s-anoj Harabăgiu, Prager kaj Sandulescu 30 membroj aliĝis.

Kurson por 20 liceanoj malfermis s-ano Siegmund Praher en la evangeliiana liceo.

S-o M. Ghidionescu komencis la 12. sept. du kursojn por 14 fratinojn.

Laŭ iniciato de fervoraj samideanoj lerneanto Marin Georgescu kaj subleĝitano J. Dragodanescu estas fondita nova grupo sub la nomo „Per ni mem“. Estas jam ĉ. 40 membroj, grandparte oficiroj kaj gestudentoj. Kunvenoj okazas en la domo de Gimnastika Societo, vendrede kaj dimanĉe. Ke rumanoj mirinde facile kaj rapide lernas Esperanton, — pro la simileco de la du lingvoj — pruvas la supre nomitaj oficiroj, kiuj dum du tri semajnoj ellernis ĝin ĝis sufiĉe flua parolo.

Saar-Teritorio.

Fondo de Saarland-Esperanto-Ligo.

Saarbrücken. Dimanĉe la 30. septembro okazis en Saarbrücken ĉefkunveno de la Saarlanda Esperantistaro, por fondi Saarlandan Esperanto-Ligon. Oni elektis kiel prezidanton s-o Krämer, instruisto el Saarbrücken, kiel vicprezidanton s-o Gerlach el Neunkirchen, kiel sekretariojn s-o Schenkel el Friedrichsthal kaj kiel kasesion s-o Bloch el Saarbrücken. Je la fino de la Kunveno parolis s-o Omlor el St. Ingbert dezirante al la nova Ligo plenan sukceson en ĝia tasko disvasti Esperanton en la Saarteritorio.

Neunkirchen. La libera laborista borso (Freie Arbeiter Börse) kunvenis dimanĉe la 23. septembro en Neunkirchen por aranĝi Esperanto-kurson inter siaj membroj. La kunveno bone sukcesis. Aliĝis al kurso 60 personoj. Kursgvidanto estas s-o Gerlach.

Gazetaro.

Excelsior, Paris, 22. 9. Pri germ. prop. kaj Esp. Les Echos Paris, 18. 9. Esp. kaj la Bulg. Minist. Le Nouvelliste, Lyon, 25. 9. Pri Nürnberg. République de l'Oise. Beauvais. Pri germ. prop. kaj Esp. Gazet van Antwerpen, 1. 10. Pri Esp. kaj l. d. n. Gazet van Mechelen, 1. 10. Pri Esp. kaj l. d. n. Plomienie, Kraków, n-o 5. Ilustr. pola skolta gazeto. Kun granda Esp.-rubriko.

Eesti Poitiseit, Tallinn, polica gazeto. Detala artikolo de s-o Pung pri enkonduko de Esp. en la policion.

Cuvântul, Braila; Medicina artikolo el ET. Gewerkschaft deutscher Postler d. tschechoslov. Republ.,

Reichenberg, aŭg.-sept. Esp. kaj poŝtisto.

Reichenberger Zeitung, 15. 9. Esp. kaj la Komercia Ĉambro de London.

Hotel-u. Gasigwerbezeitung, Reichenberg, 20. 9. pri Venezia.

Hotel- u. Gasigwerbezeitung, Reichenberg, 20. 9. pri hotelistoj kaj Esp.

Reizen en Trekken, Arnhem, organo de la holandaj turistaj societo, eldoncifero 50150 ekzempl. 2. 10. Pri Esp. kaj Esp.-kurso.

Maandblad v. d. Afd. s'Gravenhage s. N. R. V., monata organo de la Haga sekcio de Nederlanda turista asocio, 1. 10. Pri Esp. kaj Esp.-kurso.

New Jersey Post, 22. 9. Pri la septembra kunveno de la Hudson Esp. Societo.

Ununs Dzesejs, Riga, n-o 9.

S. A. L. U. S., Roma, septembro, kun Esp.-rubriko.

Voprosi Aviacii, Kazani, Rusa aviadista gazeto, 15. 8. Pri „Aereturado“ el ET; 20.—27. 9. Pri „Aereturado“ el ET; 27.—5. 8. Artikolo el Senn. Revuo; 10.—17. 9. Pri Aereturado el ET; 24.—30. 9. Dulingva artikolo ruse kaj Esp. (Ni gratulas la sukcesintajn samideanojn, klopodintaj pri enkonduko de Esp. en la gazeton. Red.)

Konservado

de Esp. parolo per gramofondiskoj.

La artikolo en ET 152 sub Scienco tuŝas gravan teknikan sukceson, kies signifon ne devas malkonsideri la Esperantistoj. La Sud-Okcidenta Filio de la Brita Esperanto Asocio jam okupis sin pri la demando: Kial nia movado ne fabrikigas gramofondiskojn Esperantistajn?

Praktike ĉiu lando havas siajn gramofondiskojn en la propra lingvo. Eĉ Kimrujo kaj Irlando, kies lingvoj ne estas tiel multe parolataj, havas siajn proprajn diskojn de kantoj, de lamajoj, ktp.

Kial ne ni Esperantistoj?

Ni devus havi diskojn de kelkaj specoj:

1. Lernodiskojn gravuritajn du-lingve, per kiuj oni povus lernigi nian lingvon.
2. Diskojn gravuritajn per niaj eminentuloj por starigi kaj daŭre fiksi la plej bonan stilon de elparolado.

Dum la kongreso en Nürnberg mi aŭdis diskutadon, dum kiu oni plendis ke aliaj naciaj elparolis Esperanton iom diference. Nu, tio estas la malfacilaĵo, kio estas la modelo, la normo? La majstro estas morinta kaj ŝajne lian voĉon neniu kaptis kaj fiksis. Do la plej granda aŭtoritato estas tute perdita. Sed samtempe ne devus esti tre malfacile por la centraj aŭtoritatoj, elektitaj kelkajn eminentulojn laŭ la ĝusteco kaj belsoneco de ilia elparolado, kaj la registra taŭgeco por la gramofono de iliaj voĉoj (grava punkto) por fariĝi gramofondiskojn, kiuj povus esti starigoj kiel modeloj de la plej belsona Esperanto. Tiuj diskoj povus esti granda helpe por ĉie plibonigi la elparoladon de Esperanto kaj korekti ĝi la erarojn nun ekzistantajn.

3. Amuzajn gramofondiskojn de kantoj, ĥoroj, recitaĵoj, humorajoj, ktp. Ni ja havas sufiĉan materialon por registriĝi milojn da diskoj.

Oni ofte informis, ke gramofondiskoj Esperantistaj jam ekzistas. Sed neniu katalogo, neniu prospekto ilin ofertas. Saĝas al mi, ke la problemoj estas tiel gravaj, ke ĝi meritas la atenton de niaj respondecaj institucioj. Ni eluzu ĉiujn avantaĝojn de l'moderna organo por akceli Esperanton.

W. R. Wood, Torquay (Anglujo).

La redakcio de ET volonte ricevos pluajn informojn pri tiu ĉi afero.

Aktuala politiko.

Ĥinujo.

El la politikaj komplikajoj en Ĥinujo rezultis la elekto de la generalo Tŝao Kung kiel prezidanto de la respubliko. Li estas el la nordo de Ĥinujo kaj gvidinto de la ĉi-lia-partio.

Turkujo.

Kiel oni scias, nova konstitucia leĝaro estas preparata en Turkujo. Oni raportas el Angora, ke la nova leĝaro enhavas la sekvantajn punktojn: Turkujo proklamas la respublikon. La prezidanto de la respubliko estas elektata por la daŭro de 5 jaroj. La granda nacia parlamento estas legdona aŭtoritato. La plenuma aŭtoritateco posedas la ministerio, kiu devas respondeci al la nacia parlamento. Oni formas nacian konsilantaron, prenanta sur sin la laborojn de senato. La membrojn elektas la prezidanto.

Renovigu vian abonon!

Scienco.

Pri la „Fino de l' mondo“.

La scienco konstatis, ke la astroj iom post iom malvarmiĝas, elradiante sian varmon en la mondspacon.

Kelkaj sciencistoj supozas, ke tiu lasta devas iom post iom varmiĝi; se ĝia temperaturo altiĝus ĝis + 40° C, la tuta vivo sur ĉiuj planedoj devus ĉesi kaj la mondo pereus pro varmejo.

La aliaj ne sin demandas pri la restado de la varmo — ili asertas, ke la astroj malvarmiĝas, ilia varmejo perdiĝas en la mondspaco, kaj la mondo pereas pro frostoj.

Sed ambaŭ teorioj vekas dubon.

La varmo ia estas movado de la molekuloj, do — kie forestas molekuloj, ne povas troviĝi kaj, sekve, ankaŭ amasiĝi la varmo.

La mondspaco estas laŭ nia scio malplena, sekve ankaŭ ne povas forpreni la varmon de la suno (resp. aliaj astroj).

La lastaj estas tiel izoligitaj kaj devas konservi por ĉiam sian varmon. Tial la teorio de la perejo pro varmejo estas ŝajne refutita.

La alia teorio — tiu de la frosta morto — kontraŭdiras al la leĝo de la konserviĝo de la energio kaj ŝajnas nebla pro la samaj kaŭzoj, kiuj valoras por la unua teorio.

Sed ankaŭ la lastaj konkludoj ne ŝajnas esti seneraraj: estas rimarkite, ke nia tero forte malvarmiĝas dum klaraj noktoj. Tiu fakto ne estas klarigebla per tio, ke ĝia varmo penetras tra la aersfero en la mondspacon; oni opinias, ke tiu-akaze la tero elradias ian ankoraŭ al ni ne konatan energiformon. Supozeble okazas ia energi-egaligo inter la tero kaj suno; se tia ne ekzistis, sur la tero amasiĝus grandegaj kvantoj da energio de tre granda detrupovo. Konsiderante la suprenomitemajn meditacojn oni devas ankaŭ revizii niajn imagojn pri la loĝateco de l' aliaj planedoj.

Oni kalkulis (sin bazante sur la supozita egala varmo-elradiado de la suno ĉiudirekten), ke la Marso devas havi la temperaturon de - 37° C (laŭ aliaj fontoj eĉ - 50° C); Venuso tiun de + 45° C. Akceptante la hipotezon pri la „energi-egaligo (aŭ egaligo)“ inter la suno (resp. sunoj) kaj ĝiaj (iliaj) planedoj ni venas al tute alia rezulto.

La komenca nebulmaso, el kiu formiĝis nia tuta mondssistemo, aŭ — malpli vastasence — sunsistemo, enhavis grandegan kvanton da energio, kiu, kondensiginte, formis la sunon kaj ĝiajn planedojn. Se tiu energio iel liberigis (ni ne konas la eventualajn kaŭzojn de tia liberigo), la suno, kune kun sia planedaro, iuj nebuloj, reveninte je sia komenca stato; do la tero pereus pro varmejo.

Allaflanke ni vidas, ke la suno troviĝas ankoraŭ en fluida, se ne gasforma stato; ni ne scias, ĉu la kunligiĝo de la liberaj energioj, forminta la sunsistemojn, jam finiĝis aŭ daŭriĝas plue. Lastokaze la tero devas, se ne „mori“, do, minimume, iom post iom malvarmiĝadi, kaj ni havos reen glaci-periodon.

La supre klarigitaj vidpunktoj estas en kontrasto unu al la alia.

Por fine kompletigi la aron da tiuj konsideroj estu aldonate, ke

1. Oni ne rajtas firme aserti, ke la etero kapablas nek akcepti, nek fordoni energion: tio kontraŭdiras al tiu fakto, ke la energio (resp. varmo) penetras de la suno tra la „etero“ sur la planedojn. Ĝuste la ekzisto de ia „etero“ estis supozita por klarigo de la energifluro inter suno kaj planedo.

2. La klarigo de la nokta termalvarmiĝado, okazanta laŭaserte sub influo de ia energi-egaligo inter la suno kaj tero, ne estas neprincipebla: la aserto, ke la energio elradiiĝas nur je la direkto de la suno, kontraŭdiras al la nuna vidpunkto de la fizika scienco.

3. Se oni parolas pri la vivebleco sur la planedoj, oni ne imagu ĝin en pure tera senco: kvankam la albumen-molekuloj ne povas ekzisti en la kondiĉoj, supozataj sur la aliaj planedoj, tamen estas tre verŝajne, ke iu alia elemento, kiel ekzemple la silicio, povas anstataŭi la karbonoksidon.

Tiutema hipotezo jam estas proklamita de la sciencisto Nernst.

Tiel ni vidas, ke la nuntempa scienco ankoraŭ ne donas kaj ne povas doni koncize-klaran respondon je tiuj demandoj de eksterordinara graveco kaj intereso: ĝi donas sole serion da supozoj, asertoj, hipotezoj kaj ... kontraŭdiro.

Gregoro Lempert, Riga.

La ruĝa tuko.

Lasttempaj esploroj dubas pri la ĝusteco de la aserto, ke ruĝa tuko povas inciti kaj furiozigi virbovon. La psikologo D-ro G. M. Stratton, la ĉefo de fakultato en la California Universitato, pruvis per kelkaj longedaŭraj eksperimentoj, ke nek bovoviroj nek aliaj bestoj estas influitaj de iu ruĝkolora objekto. Ili ĉiuj restis absolute „neutralaj“, sed montris ioman inciton, se oni svingis la tukojn, aŭ se la koloro de la tukoj estis hela. Flirtanta tuko blanka kaŭzatis la plej fortan inciton en la brutaro. D-ro Stratton demandis 66 bestbredistojn pri tiu ĉi problemo kaj 53 malaseritis, ke la ruĝa koloro furiozigas la bovovirojn.

Biologio.

Biologia ekspedicio.

La angla koloni-ministerio iniciatas biologian ekspedicion al Sud-Georgio kaj la Shetland-insuloj, por esplori la vivkultimojn de la balenoj. Ambaŭ insuloj tute dependas de la balena kaptado. Celo de la ekspedicio krome estas la konstatado de detaloj pri ofteco de la balenoj ktp. bezonataj por leĝo kontraŭ troa intenseco de la kaptado. La ekspedicio estas la unua tiaspeca. — La balenoj aperas grandnombre en somero. De kie ili venas, kien ili naĝas en vintro, oni ne scias. Ili sekva vivo estas malkonata. Ĉu ili estas pluredzineca aŭ unuedzineca oni ne scias. Kiom da idoj ili havas ĝenerale? Kiom da tempo ili vivas? Ĝis kie ili migras ĉiujare? Ĉio ĉi tio estas problemoj solvotaj per la ekspertoj. La ekspedicio konsistas el 6 biologoj kaj 1 meteorologo. La vojaĝo daŭros du jarojn. La kostojn pagas la registaro de la Falkland-insuloj. Gvidanto de la ekspedicia ŝipo estos kapitano Stenhouse, la heroo de kelkaj antarktaj ekspedicioj. Ekspedicia ŝipo estos la „Discovery“, per kiu Scott faris la mondŝanĝan vojaĝon al la suda poluso. En februaro de l' venonta iaro la aventuriera veturo komenciĝos.

Por Aktualigo de ET

ni deziras taŭgan materia'on.

Asocioj, l'goj, Federacioj,
grupoj ktp.

nepre sendu tuj

raportojn pri siaj aranĝoj: kongresoj kaj aliaj okazante'oj en nia movado.

Ĉefe ni bezonas

materialon el la praktika vivo

kaj

priskribojn de famaj vidindajhoj kun bildoj.

Mineralogio.

Gravaj trovaĵoj.

En la proksimeco de la karbminejoj de Knapiuzie en Jugoslavio oni trovis riĉajn tavolojn de hidrargo. Preparoj por sistema ekspluatado estas farataj. Tre riĉajn karbokampojn oni trovis en la proksimeco de Rogievo. Ankaŭ tie jam stariĝis kompanio por la utiligo. Fine oni trovis proksime de Niksic en Montenegro kupron de rimarkinda boneco.

Tekniko.

Nova eltrovo.

Rusa teknikisto kun nomo Strunskij eltrovis novan te'graf-aparaton similan al tiu de Hughes. La aparato havas kompare al la Morse'a sistemo la avantaĝon, ke ĝi ebligas tujan legadon de la telegramo kaj aperigon de ĉiu litero per nur unu fojo klavobato.

P. P., Kiev.

Subtera ŝtupa fervojo en New York.

El Usono oni informas pri revivigo de malnova projekto de l'konstruo de tiel nomata subtera ŝtupa fervojo. La ideo jam havas aĝon de 30 jaroj. Okaze de la Universala Ekspozicio en Chicago en 1893 la unua ŝtupa fervojo estas konstruita. Ĝi estas imita okaze de la ekspozicio de Paris. La esprimo „ŝtupa“ fervojo ne estas tute korekta. Ne temas pri fervojo celanta la superon de altecaj diferencoj, sed pri ebena fervojo, kiuj ne havas haltejojn kaj kies veturiloj enhalte moviĝas, simile al ĉiama lifto, en sama rapideco, sed kiu montras diversajn ŝtupojn de rapideco. La aranĝo estas tia, ke pluraj transportbendoj koincidaj havas diversajn proprajn rapidecojn unu kompare al la alia. La rapidecoj de la unuopaj „ŝtupoj“ estas tiel fiksitaj, ke inter ĉiu sekvanca ŝtupo kaj la antaŭa ekzistas nur relativa rapideca diferenco, kiun sana homo facile povas superi. La supreniro al la ŝtupa fervojo, same kiel la transiro al la pli alta ŝtupo ne postulas pli grandan lertecon ol la supreniro al tramvet. rilo, moviĝanta malrapide, ĉar oni ja ne bezonas superi alican diferencan.

La projekto de New York enhavas tri ŝtupojn kun rapideco de 5, 10 kaj 15 km po horo. La relativa rapideca diferenco inter la diversaj ŝtupoj de 5 kilometrohoroj do ne estas pli granda ol la rapideco de normala piediranto, 12 minutoj po kilometro. La kapableco de tia „rulantia strato“ tamen estas konsiderinde granda. Oni imagas

kapablecon de la New York'a projekto pri ekspedeblo de 52000 homoj po horo, t. e. tiom da personoj kiom transportas ĝenerale 72 vagonaroj de la subtera fervojo de New York.

Simila projekto okupas certain rondojn en Paris.

Radiotelegrafio.

La konata esploristo de la radiotelegrafio, la konata scienculo kaj profesoro de la Universitato de Bordeaux, honora prezidento de la tiea Esp. grupo, kaj membro de la Sciencia Akademio s-o Bergonie ricevis la grandan krucon de la honora legio. Cetere li suferis antaŭ kelkaj monatoj pro amputo de sia dekstra brakoj.

Internacia trafiko.

Enmigrado en Usonon.

Por forigi la neĝustajn informojn pri rifuzo de enmigrantoj en Usonon, la departemento por enmigrado en Washington sciigas, ke ĝis nun ne ekzistas malhelpoj al enmigrantoj. En junio kaj julio la fiksita kvoto ne jam estas atingita kaj ankaŭ por la venontaj monatoj malfacilaĵoj ne estas antaŭvideblaj.

Ŝipveturado.

La konata ŝip-kompanio United American Lines antaŭ ne longe malfermis novan veturservon de Baltimore-New-York al Los Angeles kun haltejo en San Francisco, Portland Seattle kaj Tacoma. 12—14 ŝipoj servos al tiu speciala servo. La nova servo pligrandigos la nunajn komunikojn. Ĝis nun servas 17 diversaj kompanioj al la ŝipeurado laŭlonge de la pacifika marbordo kaj la ŝipeurado laŭlonge de la pacifika marbordo kaj la ŝipeurado laŭlonge de la pacifika marbordo kaj la ŝipeurado laŭlonge de la pacifika marbordo kaj la ŝipeurado laŭlonge de la pacifika marbordo kaj la ŝipeurado laŭlonge de la pacifika marbordo.

Aerveturado.

En aeroplano super la pintmonta insulo.

La unuan grandan aerflugon super la arktiko antaŭ ne longe faris du germanaj aviadistoj Neumann kaj Mittelholzer. Uzinte metalan aeroplanon laŭ sistemo Junker ili dum 6 horoj flugveturis 100 km malproksimen sner la glacimondo de la neesplorita Pintmonta Insulo. Uzinte la okazon de klara vetero, ili leviĝis ĉe la Adventbajo kaj allugis al la interno de la nekonata Nord-Orient-lando. Neumann direktis la aparaton kaj sukcesis ĝin pasigi tra la malvastaj montarmuroj; batalinte kontraŭ fortaj puŝventoj. La akompaninto sukcesis fiksigi multegajn, interesajn bildojn per filmo en longeco de kelkaj centoj da metroj. Tio ebligis fiksi antaŭ ĉio tre vidindajn bildojn de la montaro. Menciinda estas la duonhora veturo super la plej alta monto de la insulo. La ekspedicio revenis kun valoraj spertoj pri la uzebleco de aeroplanoj en la polusa regiono.

Akcidento ĉe balon-konkurso.

En la antaŭ ne longe aranĝita Gordon Benett'a balon-konkurso okazis grava akcidento per pereado de du balonoj okaze de fulmotondro. Jurnalato de Paris enhavas detalajn raportojn. Unu balono estis svisa, alia hispana. Nur unu piloto estas savita, la aliaj mortis.

Foiroj kaj Ekspozicioj.

Agrikultura ekspozicio en Adana (Malgranda Azio).

De l' 15. ĝis 30. novembro okazos en Adana en Malgranda Azio Internacia Agrikultura Ekspozicio. Detalaj informoj estas haveblaj per la ekspozicia oficejo aŭ per la honorofica reprezentanto de la foiro de Leipzig s-o Jaques Cohen en Adana (Malgranda Azio).

Internacia sporto.

Pohora rapideco de 170,8 km per motorbiciklo.

La amerika motorbicikla konkurso en Kansas City je distanco de 100 mejloj t. e. 160,9 km finis per surpriziga venko de Tom Branson (Harley-Davidson) trapasinte la distancon en 1:10:11 kun mezonombra rapideco de 160,4 km po horo. Sekvis al li John Kreiger (Indian) kaj Ralph Hepburn (Harley-Davidson). En konkurenca elekta konkurso okazinta je la sama tago Jim Davis (Harley-Davidson) starigis novan rapidecan rekordon de 170,8 hor-kilometroj.

Piedpilko.

Per venko super SASK Serajewo (4:2), SC Gradjanski Zagreb fariĝis majstro de Jugoslavio. Sparta Praha iros en venonta printempo al Suda Ameriko.

Naĝado.

La belga naĝisto Van Schelle akiris en London la majstrecon de Anglujo je 100 jardoj en 57,2 sek.

Negocaj informoj.

La librejo de Gustav Rauch en Hamburg, Stadihausbrücke 3, aligis al sia entrepreno specialan Esperanto-fakon, por la tuta Esperanta literaturo. La posedanto de la librejo s-o Rauch estas malnova Esperantisto.

Parolejo.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas laŭlele enpresataj ĉiuj scilgoj, informoj, kritikoj, liberaj vortoj, ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin ĉiun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi netaĝajn artikolojn.

216. Rilatas al 208.

Tamen ŝajnas al mi, ke „la rezonado“ de s-o Andrejev ne estas erara, sed kontraŭe, ĝi estas tute prava. S-o K. Minor mem ja ankaŭ akcentas, ke la vorto „ne“ ĉiam staru antaŭ tiu vorto, kiun oni volas nei.

Kaj tute ĝuste s-o K. M. diras, ke „se iu gardas aliajn kontraŭ il, kaj ne sin mem“, tiam oni devas diri: „li ne sin gardas“. Do, en la esprimo „li ne sin gardas“ la vorto „ne“ neas nur la pronomon „sin“, antaŭ kiu ĝi senpere staras, kaj ĝi ne neas la verbon „gardas“, kaj tute de kio la fakto de la „gardado“ restas pozitiva. Sed ĝuste same devus ja esti ankaŭ kun la esprimo: „la infano ne ankorau ploras“. Ĉi tie la ereto „ne“ ankaŭ neas nur la vorton „ankorau“, sed ne la verbon „ploras“. Kiamaniere do oni rajtas egaligi la du esprimojn: „la infano ne ankorau ploras“ kaj „la infano jam ne ploras“? En la unua okazo „ne“ rilatas ja nur al „ankorau“, dum en la dua okazo ĝi rilatas al „ploras“. Evidente, en ĉi tiu okazo la rezonado de s-o K. M. estas erara. Nome: „La infano ankorau ploras“ signifas, ke la infano antaŭe ploris, kaj ankorau nun ploras. Kaj se tiu „ankoraua“ plorado estas neata, tiam oni devas diri: „la infano ne ploras plu“. Jen kiam oni povas kaj rajtas egaligi la du cititajn propoziciojn: „La infano ne ploras plu = la infano jam ne ploras“ — ĉar ĝi fice ambatoŝoje „ne“ rilatas nur al „ploras“.

Kompreneble, oni ja povas ankaŭ uzi la esprimon „ne ankorau“. Sed ĝi estas uzata nur en similaj propozicioj, kiel la supre citita „li ne sin gardas (sed min)“, t. e. — ĉe la kontraŭstarigoj de la koresponda senco de la neata vorto. Ekzemple:

Se la infano antaŭe ne ploris, sed nun nun ekkomencis plori, kaj se oni erare pensis, ke ĝi jam antaŭe ankaŭ ploris kaj ankorau nun ploras, tiam, se oni min demandas: „ĉu la infano ankorau ploras“, — mi rajtas respondi: „la infano ne ankorau ploras, sed ĝi nur ekkomencis plori“. Ĉi tie mi ne neas la fakton de l' plorado, sed nur konstatas, ke ĝi antaŭe ne ploris (same kiel en la esprimo „li ne sin gardas, sed min“).

Je la nomo de la unueco de la lingvo ni restu fidelaj al la Fundamento de Esperanto kaj ankaŭ al la „lingvaj respondoj“, kie la uzado de „jam ... ne“ kaj „ne ... plu“ estas sufiĉe detale klarigitaj.

Adolf Vimson, Tallinn, Estonio.

217. Rilatas al 201 kaj 208.

Estu permesate al mi ne konsenti kun s-o Minor, ke la rezonado de s-o Andrejev estas „ĉfara“. Certe estas ĝuste, ke „ne“ ĉiam devas stari antaŭ tiu vorto, kiun oni volas nei. Sed tio ne pravas la uzadon de esprimoj „ne jam“, „ne ankorau“. S-o Minor mem diras, ke „la infano jam ne ploras“ = „la infano ne ankorau ploras“. Do, kiel ni forgetu la klasikan „jam ne“, kaj alprenu la malbelsonon „ne ankorau“? Tute sen bezono, nur pro emo al novaĵoj! . . .

La rezonado de s-o Minor pri „ne jam trovas“ estas al mi malfacile komprenebla, almenaŭ komplikita. Prefere anstataŭ „ne jam trovas“ ni diru „plu ne trovas“, ĉar „plu“, signifanta daŭradon en loko aŭ tempo, estas sufiĉe komprenebla.

Ĉiaokaze „jam ne“, „ankorau ne“, „plu ne“ lasas lokon al malkomprenoj, do estas preferinda.

Bonvolu legi en „Lingvaj Respondoj“, la esprimon „ne jam“ (kiu signifas „ion tute alian ol jam ne“) mi tute ne konsilas uzi, ĉar ĝi povus kaŭzi malkomprenojn; anstataŭ ĝi mi konsilas uzi „ankorau ne“. — Kiel ni ne sekvu tiun ĉi konsilon de persono sendube kompetenta?!

P. Medem, Kaunas (Litovujo).

220. Rilatas al 208 (201).

Karl Minor evidente prave difinas la tonon de „ne“ en la frazo „Interese estas liamane konstanti, ke „ne jam“ = „ankorau ne“ kaj „ne ankorau“ = „jam ne“. Ĉiokaze mi opinias menciinde, ke Zamenhof, gvidata de la slavaj lingvoj, kutime uzis sole ankorau ne kaj jam ne, dum kontraŭe, la francaj samideanoj samkiel aliaj, laŭ ilia ekzemplo, enuzigis: „ne ankorau“ en la (malĝusta) senco: „ankorau ne“ kaj „ne jam“ en la (ĝusta laŭ ĉi supra) senco: „ankorau ne“.

Mi ne povas konsenti nur kun la „pliĝustigo“ de Minor en la frazo: Vladimir diris en ĉe unu vorton plu. Nia ŝatata lingvisto Minor kredigas, ke „ĉe“ ne povas esti neata. Kial? Sed ni lasu la aferon. Mi demandas ion alian: Kion signifas? Vladimir diris ĉe ne unu vorton (plu)?

Se „ne“ staras antaŭ „unu“, do ĝi evidente neas la „unu“. La rezulto povas esti: nulo, sed ankaŭ pli ol unu. Do: Vladimir diris ĉe ne unu, sed eble ĉe pli ol unu vorton!

La pridemandita frazo devas esti: Vladimir ne diris ĉe unu vorton plu.

Uzante ĉi tiun okazon mi turnas la atenton de kelkaj, precipe ĉe lingvaj samideanoj al la fakto, ke ili trozas la vorteton „ĉe“, tiam kiam ili povas tute simple uzi: ankaŭ. Malpli spertaj, do komencantaj, Esperantistoj ofte intermiksas „ĉe“ kun „mem“, laŭ la franca lingvo. Almenaŭ ne forgesu, ke „ĉe“ ĉiam staru antaŭ la koncerna vorto.

Leo Dreher.

220. „Neksta“.

Ree nova vorto! En artikolo de tre bona stilisto mi trovas „je la neksta mateno“. Verŝajne ĉi tiu novverponia vorto devenas de germana „nächste“. Ĉu ne estas sufiĉe kompreneble, se oni diras „je la morgaŭa aŭ sekvanta mateno“?

P. Medem.

Rim. de red.: Neksta evidente estas tute superflua vorto; krome tute ne internacia.

Bibliografio.

Gazetoj.

Internacia Stenografisto, Issy, Seine, n-o 3, oktobro. Pri formigo de internac. stenogr. asocio. Litova Selo, septembro. La Suda Kruco, Melbourne, aŭgusto. Bulgara Esperantisto, Sofia, septembro. Literatura Mondo, Budapest, septembro. Kiel ĉiam tre modeste aranĝita kun tre leginda enhavo. Katolika Mondo, Graz, aŭgusto-septembro. Holanda Esperantisto, Zoephen, n-o 91, 29. 9. L' Esperantista vivo, n-o 21. Organo de grupo Sellesin-Ougre, Belgujo, Hektografite. Belgia Esperantisto, Antwerpen, julio-aŭgusto. Kataluna Esperantisto, Barcelona, junio-julio. La Federacio de la Mondo, septembro. Der Arbeiter-Esperantist, Leipzig-N., oktobro. Novaj Tempoj, Leipzig-G., aŭg.-septembro. La Lumiro, Bremen, 1. 10. Sennacia Revuo, Paris. Detala raporto pri SAT-kongreso. — Nova literatura adono, kunigita kun „Nova Epoko“ Moskva.

Grava! Oni vendas germanajn patentitajn elpensajn (D. R. G. M. & D. R. P.) Bonaj artikoloj, malmultekoste fabrikelblaj. Por la elspezoj aldonu la valoron de du resp. kup. en nacia monno (ne en kuponoj). P. Becker, Del. Ll. E. A. Augustinerstrasse 58, Mainz a. Rh. Germanujo.

Ĉiu devas posedi niajn eldonajn:
Gvidilo tra Bialystok . . . 0.60 sv. frk.
Albanio 0.50 sv. frk.

Tre malmultekostaj libroj!!!
Mendu tuj ĉe
Eldonejo Esperanto Triumfonta
Horrem b. Köln.

Baldaŭ aperos
Eŭropo ĉe la abismo
de
Francesco Nitti
Iama ministrara prezidanto itala
Esperanto-traduko
kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro.

★
Petu prospektajn kaj detalajn kaj sendu antaŭmendojn je favorprezo al
Frankf. Societats-Druckerei G. m. b. H.,
Abteilung Buchverlag, Frankfurt a. M.
Korespondo en Esperanto. - Ilustr. kartoj rifuzotaj.

Varbu anoncojn!

Valora libro estas la nov-aperinta
„Litova Almanako“
285 paĝoj de modela, instrua kaj interesa enhavo.
Prezo 5,50 sv. frk.
Mendu tuj ĉe la
Adminstr. de Esperanto Triumfonta
Horrem b. Köln.
Livero al abonantoj de ET kontraŭ depreno de resp. nombro de ET-numeroj el la abonkonto.

Anoncetoj.

BONVALITAJ SAMIDEANOJ! Oficisto, malriĉulo malsana, en tre malfacila situacio, petas donaci al prunti 50 lirojn, aŭ 20 sv. frk., aŭ 5 dolarojn por vivrimedo. Helpu gesamideanoj. Adreso: Jakulin Mario, Ljubljana (Jugoslavio), Bar. pri Kolju. ŝov. 15. [2]

JE MALALTA RENTUMO serĉas pruntepreni 1000 dolarojn aŭ 200 sterlingajn pundojn. Juna arĥitekturstro por pligrandigi la negockapitalon. Laŭ deziro estas iu ĉi pruntepreni garantiata je unua hipoteke. Bonvolu skribi al L. Florian, Velké Nemčice, u., Husiopské (Ĉeĥoslovakujo). [2]

ATENTU FILATELISTOJ! Vera maloftaĵo estas kaj certege estos la nova unufoja eldono (kupro-pres) de germana poŝmarko po dek mil markoj kun bildo de Kolonia Katedralo. Kontraŭ 2½ guldenoj aŭ egalvaloro nacia mono mi sendas 2 pecojn. Mi ankaŭ dissendas ĉiujn alian pm. kontraŭ garantusmeto. Oni pagu nur per monbiletoj. Adreso: Joseph Pfaffenholz, Düsseldorf 106 (Germani). [2]

INTERSANGANTOJ ATENTU! Laŭ ĉiu foto mi fabrikas belege koloritajn Esperanto-glumarkojn, montrantajn vian portreton, nomon kaj adreson, uzebajn por fermi leterojn, beligi leterpaperojn aŭ por intersanĝo. La foto estas nedifektite resendata. Prezo: por 12 ekzempleroj 1,20 sv. frk., 36 ekzempl. 2,50 sv. frk., aŭ egalvaloro. Franz Christoph, Wien VI. Getreidemarkt 15. [1]

NIA SAMIDEANO WLADISL. MICSEC en Budapeŝt estas tregege malfeliĉiga (blindiga kaj paraliza) tie ambaŭ kruroj) kaj nuntempe li estas ŝata devigita dividi siajn enspezojn inter kvar (aliaj ekmilistoj), pro kio neniu el ili povas vivi. Mi petegas vin, samideanoj precipe bonvalutaj, helpu kiel kaj kiom eble pli povos. Jen okazo vera montri Zamenhofan spiriton. Donacojn perados Georg Menzel, Arotekstro, Breslau, Hohenzollernstr. 20. (Rekomendita de la redakcio). [2]

ANGLA MONO PAGOTA (GRANDA SUMO) por ekzemplero de OSTRONIERAJ TESTAMENTOJ EN RUSA LINGVO. La Vostokov aŭ faksimilo. Skribu al HIRST, 19 Lion Chambers, Huddersfield, Anglujo. [2]

GRAVA! Oni vendas kelkajn germanajn patentitajn elpensajn. (D.R.G.M. k. D.R.P.) Bonaj art. ikoloj, malmultekoste fabrikelblaj. Por la elspezoj oni sendu la valoron de du resp. kup. en nacia papermonno (ne resp. kup.). P. Becker, Del. de UEA, Mainz a. Rh., Augustinerstrasse 58. [1]

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Filatelistoj. Kun samideanoj de la tuta mondo mi intersanĝos kelkajn milojn da ĉeĥoslovakaj poŝmarkoj. Sendu pm. de via lando al A. Ratiborský, parfumejo. Přerov, Komenského 54. (Ĉeĥoslov.). [2]

Filatelistoj! Deziras intersanĝi pm. 200-1000 p., ankaŭ papermonon k. ĉ. l., precipe Norvegujo, Britujo, Francujo, Finnlando, sendas hungarajn kaj turkajn pm. Havas Michel 1925. S-o Augusto Kiss, Rásospalota, Ország utca 19 sz. (Hungarujo). [2]

Jesus Paluzie, en Barcelona, estas devigata malakcepti la multombrajn proponojn pri korespondado, kiujn li ricevas. Pardonu ĉiuj! [2]

Filatelistoj atent! Ĉiujn poŝmarkojn de Danzig; malnovajn, novajn kaj aperantajn mi vendas malmultekoste. Ankaŭ ŝanĝas kontraŭ nur bonaj, maloftaj de ĉ. l. Ĉiuj deponas iun sumon da mono, tiu ricevas ĉiam laŭlablan kvanton da nove aperantaj pm. ĝis elĉerpio de l' sumo. Ankaŭ liveras germ. pm. maloftajn kaj provizorajn. Oni sendu naciajn monbiletojn en rek. letero. Garantio por akurata kaj kontentiga livero. H. Remers, Düsseldorf (Germani), Luisenstrasse 97. [2]

S-o Theod. Hörning, insiŝtulo, Oberneuschönberg bei Olbernhau/Sa. (Germ.) deziras korespondi kun samprofesuloj el ĉ. l. pk. l., intersanĝas Esperantistojn. [2]

F-ino Joséphine Orjens, studentino, 20 jara, Klappdorp 16, Antwerpen (Belgujo) deziras korespondi per il. pk. [2]

S-o H. Van der Mast, Lange Van Ruysbroeckstr. 56, Antwerpen (Belgujo) intersanĝas pm. k. ĉ. l. Sendas tiu saman katalogvaloron en belgaj pm., laŭ katalogo Yvert 1924. [2]

S-o Antoine De Vilder, komercisto, Zele (Belgujo) deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo per il. pk. [2]

S-o Georg Florentinski, Niesiweń (Polujo), koj Studencka 56 deziras intersanĝi pm. papermonojn el. pk. k. l. [2]

F-ino Gerda Jürgensen, Osterstrade 12, Holback (Danujo) deziras korespondi per il. k. ĉ. l. [2]

S-o Jozefo Gyenge, impostoficisto, Timișoara (Rumani), strada Telegrafului 27 deziras intersanĝi pm. kun gesamideanoj de la tuta mondo, precipe kun turkoj, grekoj kaj italaj. [2]

S-o Arthur Frieder, Cluj (Rumani) Ledofabrikeo Renner, intersanĝas pm. kaj papermonoj k. ĉ. l. Reveninte hejmen mi tuj respondos al miaj korespondantoj. Mi serĉas ankorau aliajn poŝmarkkolektantojn. Gabrielo Daly, Cluj (Rum.) Mikes Kelésem. [2]

S-o Andro Felvinczy, Cluj, Str. Regina Maria 42, II, (Rum.) intersanĝas pm., pk. kaj papermonoj k. ĉ. l. [16]

Kontraŭ 100 allandaj pm. samkvanton da rumanj sendas Petro Frana, profesoro, Cluj, Calea Victoriei 89. Precipe kontraŭ belgaj, nederlandaj kaj italaj. [2]

S-o Samuelo Szentkiralyi, direktoro de supera komerca lernejo. Cluj (Rumanujo), Școala Superioara Comerciala, deziras intersanĝi pm. kun anglaj, francaj, italaj, hispanaj kaj balkan-ŝtataj serizoj kolektantoj. [2]

S-o Josefo Remes, razisto, Rové-Zámky (Ĉeĥoslov.) deziras ŝanĝi naturvidadojn kaj fotografadojn il. pk. k. ĉ. l., precipe eksteritropaj. [2]

S-o Viktoro Badin, komercisto, Nové Zámky (Ĉeĥoslov.) deziras ŝanĝi por propagandaj celoj il. pk. bfl. kolojn t. e. populipoj kaj urbobildoj kun la tuta mondo. Respondas certe. [2]

Kelkaj anoj kaj kursanoj de grupo E. R. A. deziras korespondadi il. pk. Oni skribu al D-ro Karlo Körper en Nové Zámky (Ĉeĥoslov.). [2]

S-o Rich. Litzbach, Kanistr. 17, Breslau 25 (Germani) intersanĝas kaj vendas pm. moneretojn ktp. deziras korespondadi kun ĉiuj landoj. [2]

S-o Francisko Armuth, Kaposvár, Korona u. 14, (Hung.) intersanĝas belajn kaj bonajn pm. Mi havas multajn belajn hungarajn pm. [2]

Kun ĝentiligentuloj de la tuta mondo korespondadas volonte per il. pk. kaj leteroj pri diversaj interesaj temoj. H. Pek, Moritzstr. 5/II/55, Wien VI, Aŭstrujo. [2]

S-o Jaan Lõhmus, Valk, Tannenpergi 1.9, Estonio, deziras intersanĝi pm. kontraŭ estonaj kaj latvaj kaj il. pk. k. ĉ. l. [2]

Kiu sendos al mi 50-100 pm. de sia lando, ricevos saman kvanton de mia lando. Mi ankaŭ korespondas per il. pk. kun ĉiulandaj gesamideanoj. Herm. Wolfertz, Menzelen-Rejnlando (Germ.). [2]

Fraŭlo Tiberio Hajdu, Bauská Bystrica, Lazovná (Ĉeĥoslov.) deziras korespondi per il. pk. (bfl.). [2]

S-o Panŝin S. M., ul. Liebknecht, Kinai (Tvera gubernio) Rusujo, Pedagoĝo, deziras serioze korespondi kun ĉiulandaj samprofesuloj kaj aliaj personoj, precipe per fermataj leteroj. Ne intersanĝas bagatelajojn. [2]

S-o Maurice Ghidionescu, Str. Tebacari 81, București (Ruman.) deziras korespondi kun Esperantistoj kaj Esperantistoj de la tuta mondo. [2]

Fraŭlo Richard Letfler, Luherstr. 8 Weissenfels a. S. (Germ.) deziras koresp. kun la tuta mondo, prefere eksteritropaj; same per stenografio, Gabelsberger-Schramm. [2]

S-o Richard Theml, instruisto, Kriesdorf A. T. E. (Ĉeĥoslov.) deziras seriozan korespondadon kun gesamideanoj (ne komencantoj) el tuta mondo (esc. el Ĉeĥ. k. Germ.) per il. (bfl.) aŭ l. (temoj: popokultimoj, Esp.-stenografio). [2]

S-o Richard Hauber (20-jara) Otostir. 1, Kaiserslautern (Germ.) deziras korespondi k. ĉ. l. per il. pk. Ankaŭ intersanĝas pm. kaj papermonoj. Mi sendas konstitucitateron kontraŭ 1 sv. frk. [2]

Fraŭlo direktanta mekanikisto, 20 jara, deziras korespondadon k. ĉ. l. per il. pk. kaj pm. kaj sciencajn librojn. Adreso-Antonio Carrasguilla, str. Conde del Asalto 170, pral. 4a 11, Barcelona (Hispanujo). [2]

Fraŭlo Moritz Bengtsson, Hasvedua (Svedujo), deziras korespondi Zsp. kun la tuta mondo per il. pk. kaj l. [2]

F-ino Anatolij Džanko, Studencka 5, en Niesiweń (Polujo) deziras korespondi kun la tuta mondo per il. pk., intersanĝas pm. kaj papermonojn. [2]

Rusaj samideanoj — legemuloj, kiuj deziras havi ĉiam fresan kaj abundan legomaterialon Esperantan, skribu al mi. Por respondo nre aldonu pm. J. Sirjaev, Baklanka, gub. de Volgoda (Rusujo). [2]

S-o K. Matycha, Bydgoszcz, (Polujo), Lokietka 1 deziras intersanĝi pk. il. k. ĉ. l. Tuj respondos! [2]

Filatelistoj! Por 2 sviz flk. aŭ egala valoro mi sendas 80 div. maloftajn poŝmarkojn de la liberŝtato Danzig. Intersanĝas pm. Oskar Köhler, Ölsnitz i. Vgl., Bergstr. 5. [15]

Ruslandaj samideanoj atent! Mi deziras korespondi kun samideanoj prefere el la regiono de Minsk aŭ Kiev pri ĉiu temo. Bonvolu skribi al Alfons Goppert, A'tes Gymnasium, Regensburg, Bayern, Germ. [2]